Semajno de Internacia Amikeco

PILO-PRESS

Internacia

Informservo

23-a - 29-a de februaro 1976

N-ro 5/76 - 30 jan 1976

Aperas ĉiusemajne

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg
Tel. (0911) 463649; 514269



Salutu viajn amikojn per anonceto en PILO-PRESS, prezo 2 GM

## Por la prospero de Bona Espero

Münster (pp) - En Münster fondiĝis amika rondo por la prospero de Bona Espero, la Esperanto-komunumo en Brazilo. La rondo klopodas ĝermigi kaj kreskigi la semojn, kiujn la geamikoj Grattapaglia kaj Diniz plantis dum sia komuna prelegvojaĝo tra Eŭropo. Pluraj grupoj en aliaj urboj jam promesis kunagi per diversaj aktivecoj. Informojn donas: S-ino Ursula Schrapp, Schmittingheide 17 d, D-4400 Münster, FRG.

Ni opinias, ke Bona Espero estas granda ŝanco por ni; ke ĝi prosperu, estas nia intereso. Ĉiu el ni ja dediĉas multe da laboro, mono kaj aliaj klopodoj por diversaj, ofte anonimaj, kelkfoje eĉ obskuraj, celoj bonfaraj por malsatuloj, katastrofoviktimoj, malsanuloj kaj infanoj.

Bona Espero estas n i a infanvilaĝo, la sola vilaĝa komunumo, kie Esperanto estas la ĉiutaga lingvo, kie kapablaj kaj fervoraj adeptoj de nia lingvo idealisme dediĉas sian tutan vivoforton al tiu socia celo, sur neŭtrala lingva fundamento.

Ni klopodu komune, ke Bona Espero, ekzistanta jam de pli ol 16 jaroj, ne denove malaperu sub kurteno de forgeso kaj inerto. Jen nia ŝanco!

Willi Brandenburg

## La "Omaro" lasas spurojn

Romo (pp/ra-ro) - Ni jam anoncis, ke la 4-an de januaro la redaktoro de la Esperanto-elsendoj de Radio Roma, d-ro Antonio De Salvo, partoprenis unu el la plej popularaj elsendoj de la itala radio, kiu nomiĝas "La Omaro", ĉar la konkursantoj, anstataŭ gajni se ili respondas ĝuste je kvizoj, malgajnas se ili respondas malĝuste.

D-ro De Salvo, kiu cetere gajnis 250 mil lirojn kaj kondutis kiel la plej lerta el la tri konkurantoj, ankaŭ menciis sian Esperanto-agadon. Sekve de tio, li jam ricevis plurajn telefonadojn de aŭskultantoj, kiuj scivoleme demandis pri Esperanto, kaj eĉ oni proponis al li prelegi pri la problemo de internacia lingvo en la sidejo de kvartala centro por socialaj iniciatoj.

## Afiŝoj propagandas Esperanto-Kursojn

Romo (pp/ra-ro) - Ankaŭ ĉi-jare, la Sociala Instanco de la Italaj Ŝtatfervojoj pagis la presadon de plaĉaj, dukoloraj afiŝoj, kiuj reklamas pri Esperantokursoj en diversaj urboj, i.a. en Bologna kaj Roma. Cetere, ĉiuj fervojaj instalaĵoj en Romo, inkluzive de la Ministerio pri Transportoj, estas provizitaj per tiaj afiŝoj, en la plej vizitataj lokoj.

Pri la Roma kurso, kiu disvolviĝas en la sidejo de la Fervojista Post-Laborejo, ankaŭ mallonge raportis la Roma ĵurnalo "Il Messaggero" de la 8-a de januaro 1976.

*************

Vizitu la Eŭropan Esperanto Kongreson Paskon 1976 en Eindhoven!

Petu aliĝilon kaj informon de Eŭropa Esperanto Kongreso, Floraplein 23, Eindhoven, Nederlando.

Itala pioniro mortis

Bologno (pp-ra-ro) - Funebra anonco publikigita en la roma ĵurnalo "Il Messaggero" sciigis al ni, ke la 28-an de decembro 1975 ĉesis bati, en Bologna, la nobla koro de advokato Raffaele Bagnulo, la plej maljuna el la italaj esperantistoj, kaj unu el la plej fruaj pioniroj de la Esperanto-movado en Italujo.

Naskiĝinte en Napolo la 29-an de majo 1880, adv. Bagnulo estis pli ol 95-jara; kaj alproksimiĝinte al Esperanto en 1902, kiam la Esperanto-movado, precipe en Italujo, estis ankoraŭ ĉe la unuaj nefirmaj paŝoj, li sin dediĉis al la internacia lingvo, kun entuziasmo kaj fervoro, dum pli ol 73 jaroj.

Adv. Bagnulo kunfondis la unuan Italan Esperantistan Societon, kaj la unuan Esperanto-gazeton en Italujo, "L'Esperantista", post kies malapero li kreis alian, titolitan "Gefrataro Esperantista". Per ĉi tiu lasta gazeto li, cetere talenta poeto en la napola dialekto, diskonigis plurajn verkojn de la napola kaj itala literaturoj, interalie la unuan provon de traduko el la "Dia Komedio".

Dum la unua Universala Kongreso en Bulonjo-sur-maro, 1905, li estis elektita en la ĵus fondita "Lingva Komitato", kaj sekve de tio li estis en daŭra korespondado dun d-ro Zamenhof. Intertempe, li vigle partoprenis la nacian vivon de Esperanto. Li estis la unua delegito de UEA en Napolo, jam antaŭ la jaro 1909, kaj en tiu urbo li ankaŭ fondis la Esperantogrupon kaj gvidis la unuan Esperanto-kurson. Dum la jaroj 1906-1907 li rimarkinde propagandis per paroladoj, kursoj, artikoloj ktp. En 1910, li partoprenis la starigon de la Itala Esperanto-Federacio; en tiu sama jaro, li eniris la advokataron de la itala ŝtato, kie li atingis eminentan pozicion kiel Vicadvokato ĝenerala.

En ĉiuj urboj kie li vivis dum sia brila kariero, adv. Bagnulo prelegis kaj gvidis Esperanto-kursojn. Post la emeritiĝo, li eĉ pli sin dediĉis al la movado, kun renovigita entuziasmo kaj ankoraŭ freŝaj energioj, kaj utiligante la altan gradon atingitan, li multe influis por la akiro de kelkaj oficialaj agnoskoj: ekzemple, li sukcesis inkluzivigi la Esperanto-aktivecon inter la agadojn, kiuj indas la distingon de la ordeno je merito por la Itala Respubliko; pro lia interesiĝo, la Universala Kongreso de Bologna, 1955, havis kiel protektantojn la tiaman Prezidenton de la itala respubliko kaj la du antaŭajn Prezidentojn; en 1959, la Itala Ministerio pri Publika Instruado donis subvencion por la celebrado de la Zamenhof-Jaro.

Ni menciu kelkajn aliajn aspektojn de la multforma poresperanta agado de adv. Bagnulo: Li verkis Esperanto-gramatikon; en 1959 li estis la oficiala oratoro dum la solena celebrado de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof; en 1962, li dissendis informojn pri Esperanto al ĉiuj italaj parlamentanoj, ktp.

Ankaŭ en la lastaj jaroj, plene konscia malgraŭ alta aĝo, adv. Bagnulo interesiĝis pri Esperanto. Lia verva kaj nelaciĝebla karaktero elstaras en ĉi tiuj vortoj, kiujn li skribis jam 80-jara: "Ĉar mi estas plenumonta kaj finonta samtempe mian vivon kaj la pasian agadon por la firmiĝo de Esperanto, mi ne volas ripozi...."

Laŭ Radio Roma


Novaj prezoj por:

| | |
|---|---|
| Fundamenta Krestomatio de L.L. Zamenhof | 14,50 DM |
| Esperanto por infanoj, legolibro por infanoj | 3,-- DM |
| Gaja leganto per Esperanto | 2,-- DM |

## Pri Esperanto en Maroko

### Salutoj de Esperanto-lernantoj

Inezgane (pp) - Atingis nin la "Unua Cirkulero" kaj salutkarto de Esperanto-rondo en Inezgane sub gvido de s-ro Mas. Ĉi-sube ni publikigas la salutkarton:




Krome ni citas el la cirkulero: "Ni estas feliĉaj informi vin, ke la 15-an de decembro dum prelego pri Esperanto farita de nia gvidanto, s-ro Mas (instruisto en nia liceo) ĉeestis ĉirkaŭ cento da grandaj liceanoj, tre interesataj. Sekve de tio, ĉirkaŭ 40 gelernantoj komencis la lernadon (duope, triope ktp. en la hejmo de nia gvidanto ĉar ni ankoraŭ ne obtenis permeson komenci publikan kurson). Kompreneble ne ĉiuj daŭrigis, sed ni estas 9, kiuj regule studas la internacian lingvon. Ĉar la plej granda parto de la lernantoj ne povas aĉeti eĉ siajn "normalajn librojn" pri matematiko ktp., ni devis multobligi lecionojn, ekzercojn ktp. Ni tre dankas ĉiujn eldonistojn kiuj permesis al ni fari tion (senpage!) kaj tiuj kiuj sendis librojn je grava rabato ĝis 50 %....

Nun ni preparas prelegojn en la aliaj liceoj de Agadir kaj ĉirkaŭ la 15-a de marto publikan prelegon en la "Junulardomo"de Agadir.

Se vi povos sendi al ni poŝtkartojn, tio helpos multe nin por eksponono, kiu komencos en Agadir post unu monato. Ni samideane salutas vin, dankinte kaj antaŭdankinte."

Adreso: S-ro Mas, B.P. 171, Inezgane, Maroko

************

## Esperanto en la radio

Pro la aktuala informo el Maroko, ni bedaŭrinde devas limigi la radian angulon. Sed mi nepre diru, ke en la leterkestoj de Pola Radio regas ankoraŭ granda diskuto pri la "kosma" nombro de korespondaĵoj. Multaj citaĵoj el leteroj de aŭskultantoj, speciale pri la jarfina programo, plivigligas la enhavon de la leterkestoj!

Germana Esperanto-Ekspozicio Augsburg 1976
Deutsche Esperanto-Ausstellung Augsburg 1976
==========================================

Honora Protektanto: Ĉefurbestro de Augsburg
Hans Breuer

Loko: Urbodomo "Unterer Fletz" Augsburg

Dato: 24-a de aprilo ĝis la 9-a de majo 1976
Horo: Ĉiutage de la 10-a ĝis la 18-a horo

Inaŭguro: Sabate, la 24-an de aprilo 1976
je la 11-a horo

Ĉiutage okazas en la ekspoziciejo provlecionoj pri Esperanto, je la 15-a, 16-a kaj 17-a horo

****************

Kadra programo:

Sabate, je la 24-a de aprilo 1976
je la 15a horo: Kunveno de Bavara Esperanto-Ligo en Sindikata Domo
Kun Librostando
je la 19-a horo: KULTURA VESPERO
en Augustana-haus
Kun Librostando

Dimanĉe, je la 25-a de aprilo 1976
je la 10-a horo Kunveno de kursgvidantoj
Konferencĉambro Hotel Post

je la 14-a horo Rondirado tra la urbo

******************

La organizantoj de la ekspozicio kaj de la kadra programo invitas la esperantistojn el F R Germanio, speciale el Bavario, kaj ankaŭ el eksterlando, viziti la ekspozicion kaj partopreni en la kadra programo.
Informojn pri tranoktebleco kaj restado en Augsburg donas Hermann Schmid, Alte Reichsstrasse, 8901 Steppach.

Venu al Augsburg! Augsburg valoras viziton!